

Leterkesto, 3-a parto
Claude Gacond, 196-a radioprelego, 1967.07.12 & 1967.07.15

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj ĉerpante el nia leterujo. Komence ni dankas pro iliaj salutoj sinjoron Richard Schneller en Wien, Aŭstrio, gesinjorojn Gaston Turin en Pontarlier, Francio kaj G. Coulon en Montbéliard, Francio, sinjoron Bruno Gahler en Hamburg, Okcidenta Germanio, sinjoron G. van der Horst en Hago, Nederlando kaj la familion Tucker en Austwick, Britio.

A.- Sinjoro D. B. Gregor en Northampton, Britio, tute konsentas kun ni pri niaj rimarkoj koncerne al la afiksoj neregistritaj en la lernolibroj. Li aldonas :

Cl.- « *La lernolibroj devus turni pli da atento al la afero de la vortfarado en esperanto. Kelkaj ja atentigas pri la diferenco inter la transitivaj kaj netransitivaj verboj ; sed la kategorieco de la radikoj estas ne malpli grava.* »

A.- Ni estas tre fieraj scii, ke niaj elsendoj estas atente aŭskultataj en Ameriko de anoj de la Indiana Universitato. Raportas pri tio sinjoro Richard E. Wood en Bloomington, Indiana, Usono.

Cl.- Nia usona samideano sendis al ni dokumentojn pri la esperanto-kursoj en la Indiana Universitato, kaj diris sian intereson por niaj temoj.

A.- Ni legos al vi kelkajn erojn el tiu vivsigno de niaj usonaj aŭdantoj :

Ck.- « *Tre interesa via diskurso pro la finaĵo al kaj la aliaj gramatikaĵoj. Mi certigas al vi, ke, se la ricevo estas bona, mi surbendigis viajn programojn kaj ekuzos ilin en mia kurso, kiun mi ĵus komencis instrui, kune kun mia kolego Duncan Charters, ĉi tie en ĉi tiu universitato.* »

A.- Pri tiu kurso li entuziasme raportas. Ni esperas, ke la intereso de la kursanoj daŭros. Aŭdu ;

Cl.- « *Esperante, ke ili estas interesaj al vi, mi kunsendas informojn pri nia kurso. Mi povas diri, ke ĝi vere ne estas rezulto de propagando de la nunaj esperantistoj, aŭ nur parte tiel, sed ĉefe rezulto de subita kresko de studenta kaj profesora intereso pri esperanto ĉiloke. Kiam ni okazigis nian unuan lecionon venis kvardek studentoj; nun, por la dua semajno, ni dividis la kurson, celante altiri eĉ pli per alia tago por tiuj, kiuj ne kapablis veni jaŭde.* »

A.- Sinjoro Charters ankaŭ sentas la bezonon pri verkado de kurso adaptita al la nunaj cirkonstancoj. Li intencas aperigi lernometodon post la fino de la semestro. Ni atendas sciigojn pri tiu laboro.

Cl.- Kiel niaj usonaj samideanoj, ni ankaŭ konstatas subitan kreskon de intereso pri nia lingvo, kaj tio ĉefe kiam la propagandistoj ĉesas tedi la publikon per misinformoj kaj kiam ni provas nur respondi al la informpetoj de la interesatoj.

A.- Sinjoro Norbert Merckens en Wuppertal-Barmen, Okcidenta Germanio, ŝatis nian prelegon pri Grabowski. Li sciu, ke ĝi aperos en la gazeto *Sennaciulo* sub la rubriko *80 jaroj de esperanta vivo*.

Cl.- Fraŭlino Olga Thander en Pietersaari, Finnlando, laŭdas nian laboron dirante :

A.- « *Ĉiuj programoj estus indaj ricevi mencion.* »

Cl.- Ŝi raportas pri la du- aŭ eĉ tri-lingvismo en Finnlando. Ŝi poste rakontas la riĉigon, kiun alportis al ŝi esperanto. Nur dank'al esperanto kaj per nia radio ŝi aŭdis pri la kimbanguismo,

Leterkesto, 3-a parto
Claude Gacond, 196-a radioprelego, 1967.07.12 & 1967.07.15

tiu kristana eklezio, kiu spontanee kreiĝis en Kongolando kaj estis persekutita de la katolikaj kaj protestantaj misioj.

A.- Same sinjoron Pal Balkanyi en Budapeŝto, Hungario, interesis nia raporto pri la kimbanguismo. Ni sendas al ambaŭ dokumenton pri tiu afrika eklezio. Bedaŭrinde ĝi ne estas redaktita en esperanto, sed en la franca.

Cl.- Sinjoro Lennart Aberg en Skövde, Svedio, dezirus ricevi nian raporton pri la Nica Kolokvo. Bedaŭrinde ĝi ne aperis en gazeto. Ni redaktis ĝin nur por nia radio-programo. Kaj ni posedas nur nian manuskripton. Se tiu teksto foje aperos en gazeto, ni vin informos pri tio.

A.- Radio-elsendo estas efemera fenomeno. La rolo de niaj elsendoj estas ĉefe vekti la atenton de la esperantistoj pri homaranaj kaj prilingvaj objektoj. Al ĉiu poste mediti aŭ forgesi tiujn temojn.

Cl.- Kiam ni trovas la necesan tempon, ni reverkas niajn prelegojn por ilin adapti al la gazetaj bezonoj. Tiujn artikolojn ni sendos al diversaj multlegataj gazetoj. Ni ĉiam avertos vin pri tiuj aperoj.

A.- Sinjorino H. Zwaanswijk-Dik en Alkmaas, Nederlando, sendis salutojn. El tiu lando ni ricevis du longajn leterojn de sinjorino D. de Vries Suwijn kaj fraŭlino W. Steffering, ambaŭ en Leeuwarden. Ili raportas pri la kreo en ilia urbo de zamenhofa parko.

Cl.- Pasintan jaron skulptaĵo alta je tri metroj estis pompe starigita en tiu parko. Verko de la skulptisto Tjeerd Visser, kiu simbolas la ideon, ke el la ĥaoso la homaro iom post iom kreskas al la unueco.

A.- Por simboli tiun unuecon de la homaro la esperantistoj de Leerwarden rilatis kun samideanoj el la tuta mondo. Rezulto de tiu korespondado estas la rendevuo en la zamenhofa parko en Leewarden de rokoj el plej diversaj lokoj.

Cl.- Rozkolora marmoro donas ideon pri la ŝtona aspekto en Bulgario. El Nord-Ameriko alvenis sablgrizeta roko, el Ruslando nigra marmoro, ktp.

A.- Tiu kunekzistado de plej diversdevenaj rokoj rememorigas al la parkumantoj, ke la kunekzistado inter la diversgentanoj ankaŭ estas ebla. Ĉiu roko posedas proprajn ecojn. Same estas por la popoloj. Ĝuste estas tiu diverseco, kiu estas agrabla en la zamenhofa parko en Leewarden. Same inter la homoj la diverseco devas esti kulturata. Ĝi plivalorigas tion, kio estas komuna al ĉiuj homoj.

Cl.- Sinjoro J. Kondor en Lampertheim, Germanio, ŝatas la dialogan formon de niaj elsendoj kaj konservis en la memoro nian rakonton pri la vilaĝo milloĝantara, kiu simbolis la situacion en la nuna mondo. Tiu elsendo ne ankoraŭ aperis forme de artikolo.

A.- Sinjorino Elizabeta Regöci en Budapeŝto, Hungario, avertas nin, ke pasintjare fondiĝis Internacia Ligo de Esperantistoj-Pupistoj.

Cl.- Tiuj samideanoj okupiĝas pri pupteatro.

A.- Do ne nur rokoj eksimbolas la interpopolan kunvivadon. La pupoj ekparolas esperanton. Ĉu la homoj komprenos tiun alvokon al homaranismo ?

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-